



la juna vivo

NOVEMBRO 1945

MONATA ORGANO DE TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

INTERNACIAJ JUNULAR-KUNVENOJ.

S.ro Grönborg, dana instruisto, skribis:

Mi estas preta helpi vin pri la infaninterŝanĝo venontsomere kaj uzi mian sperton pri la aŭtobusvojaĝoj. Mia intenco estas tuj skribi artikoleon por la Esp. gazetoj en nia lando kaj la neŭtrala kaj la laborista, kaj tie preparoli vian planon kaj peti ĉiujn instruistojn kiuj havas infankursojn skribi al mi, ĉu venontsomere, 14-taga restado en Nederlando havas intereson por ili kaj iliaj infanlernartoj, eble pli ĝuste inter la junularo (en la aĝo 13—25) kaj rekompence, ĉu oni en Esperantistaj hejmoj volas akcepti nederlandajn infanojn kaj gejunulojn por 14-taga gastigado.

Ĉu vi opinias, ke ni kapablos venontsomere sendi de la printempo ĝis la aŭtuno aŭtobusojn plenigitaj de infanoj kaj gejunuloj, ekzemple unufoje monate kaj proksimume 30 personoj ĉiufoje kune kun karavangvidanto?

Estus ja tre alloga perspektivo!!!

Harald Grönborg. (Danujo)

Feliĉe!! Niaj energiaj TJO-anoj ekkomprenas, ke ni ne plu longe povas revii kaj paroli pri la frateco de la homaro, sed ke ni devas agi.

D.ro Zamenhof skribis: Ĉiu vera religiulo, humanisto aŭ framasono, kiu el la anaro de la parolantoj kaj revantoj transiras al la efektivigantoj, fariĝas per tio „homarano“.

La tempo do estas matura, en kiu ni devas fiksi praktikan fundamenton, sur kiu ni povas konstrui novan mondon. Pro tio ni nepre devas aranĝi en 1946 Internacian Kunvenon.

Ĝi okazu prefere en la proksimeco de Ostende, do en Nord-Francujo aŭ Belgujo. En la venontaj numeroj espereble troviĝos pli detala plano.

En la Esperanto-klubejo „Nia Kastelo“ en West-Grafdijk, okazos 3-taga kunveno (22-23-24 Decembro). En tiu kunveno ni jam klopodos ellabori provizoran bazon kaj laborplanon.

Ni kunvenos en hejmeca sfero. La seriozaj preparoloj alterniĝos kun kantado, muzikado, deklamado, ktp. La klubanoj zorgos por tranoktejo. La partopreno-kostoj estos proksimume 2 guld. Oni anoncu sin kiom eble plej baldaŭ, ĉar la kunveno ne estas granda, do la partoprenantaro estos limigita. Oni sin anoncu al S.ino v. Veenendaal, Limmen. Tranoktejon oni petu ĉe F.ino N. Kool, West-Grafdijk.

NIA ADOLFO.

Estis germana soldato, kiu kelkfoje venis al mia hejmo por peti ion. En la komenco mi tute ne parolis kun li, sed nur respondis al liaj demandoj. Sed foje li movis la piedon, tien kaj reen kaj rigardadis la plankon kaj diris kun raŭka voĉo: „ne estas plezuro esti soldato, la vivo ne plu havas feliĉon por mi.“ Sed mi ne tuj respondis, ĉar mi timis, ke estis nur sentimentalajo de la germano. Tiam li subite diris: „Ho s.ino mi ankoraŭ estas tiel juna, mi volas tiel volonte vivi.“ Mi rigardis liajn okulojn kaj vidis du sincerajn, tre junajn okulojn. „Sed vi ja havas Hitler, por kiu vi volonte mortos ĉu ne“ moke demandis. Sed li neis tion, kaj kio montriĝis tiam? Ke li ege malamis la diktatoron. Mia edzo ankaŭ poste partoprenis la interparolon kaj ni triope parolis ĝisnokte. Li rakontis multe al ni pri malpermesitaj aferoj. Dum la tuta vespero ni flustre parolis. Finfine mi diris: „Kio estas via nomo“. Kaj li respondis: „Adolfo“. Tiam ni triope ridis kaj poste ridegis, ĉar li tiel malfeliĉe elparolis la nomon.

Femmy Bakker—Kroon.

PROPRIA KLUBEJO.

Nia klubo en West-Graafthijk (TJO-sekcio) havas 22 anojn.

Unufoje semajne ni kunvenis en la domo de s.ino Kool, kiu ĉiam tutkore cedis al ni sian ĉambron. Sed estas pli bele havi propran klubojn, ĉar ĝi pli havigas la senton de mem-stareco. Cetere, ni bezonis ejon por instrui tridek komencantojn.

Sed kiamaniere akiri klubojn en nia tempo de manko je domoj! Ni nur povis lui domaĉon, ea kiu neniu volis loĝi, do en kiu ni ankaŭ ne povus kunveni! La sola solvo estis rekonstrui ĝin per la ligno, kiun ni povis forrompi el la domaĉo. Ĉar ligno por rekonstrui ankoraŭ ne estas aĉetebla en Nederlando. La dometo konsistis el du ĉambroj kaj vestiblo. El la ĉambroj ni forrompis la ŝrankojn kaj litojn (la litoj fakte estis litŝrankoj, kiujn oni trovas nur en tre malnovaj domoj). Per tiu ligno ni riparis la plankon (kiu estis tute putranta) kaj la vandojn, en kiuj estis grandaj „malfermajoj”. Ni ankaŭ faris murobenkon, Mallonge, ni faris el la domaĉo ĉarman ejon, kiu nun konsistas el: kunveneja ĉambro, kuirreĵeto, vestiblo kaj biciklejo.

Ruut, nia elektristo en la grupo pretigis la elektran lumon. Post kiam la knabinoj purigis ĉion (eĉ la kamentubon!) ni ekfarbis. Por tio ni ricevis de mia patro oleon, ĉar alie oni en Holando ankoraŭ ne povas akiri taŭgan farbon. Ankaŭ ekstere ni kolorigis, kaj sur la tegmenton ni starigis grandan verdan stelon. Nia meblisto Johano faris tablon el du ŝrankopordoj, kaj poste li faros seĝojn. Kaj por pli beligi la internon onklino Nel faris kurtenojn, por la fenestro kaj ŝrankoj. Ankaŭ forno ne mankas. Eĉ brulajojn ni iom havas. Ĉe nia vilaĝo kuŝas torfo sub la akvo. Koos eldragis tion, kaj faris brulajojn el ĝi. En la ĝardeneto antaŭ nia domo ni starigis flagfoston (masto de la velsipo de Koos). — Nur ankoraŭ la nomo. Bets proponis „Nia Verda Kastelo”. Tio estis tre longa nomo, do ni poste decidis nomi ĝin „Nia Kastelo”. Kaj post kiam ni pentris tion super la pordo, nia domo estis preta.

Multajn horojn ni laboris por nia domo, sed estis tre harmoniaj horoj, kaj mi esperas, ke ankoraŭ sekvos multe da tiuj horoj, kiuj fortigas nin por konstrui la grandan konstruaĵon: La Idealon de dro Zamenhof!

M. Leegwater.

„NIA KASTELO”.

Dimanĉon, la kvaran de novembro mi inaŭguris nian klubdomon „Nia Kastelo”.

La turhorloĝo sonorigas la 10an horon. Mi kuras rapide al la klubdomo. La buterpanojn en la tornistro, ĉar ni komune manĝos.

Mi ankaŭ kunportas mian kantaron. Mi eniras la klubojn kaj vidas tie s.inon v. Veenendaal kaj multajn aliajn geamikojn. La amikeco estas bonega!

Jen venas Jo Geus. Li tre rapide biciklis, ĉar li timis, ke li venos tro malfrue. Sed ne, Koos ankoraŭ ne ĉestas, kaj li devos hisi la flagon. Fine venas Koos. Nun staras ĉiuj ekster la domo. Onklino Nel nombras ĝis tri kaj malrapide iras nia flago pli kaj pli alten. Kaj ni kantas la belegan kanton de d.ro Zamenhof „La Espero”. Tio estis la plej bela momento de la malfermiĝo.

Nun ĉiuj eniras la klubdomon. Guus, la prezidantino de nia grupo parolas kelkajn vortojn. Ankaŭ s.ino v. Veenendaal parolas tre bele pri nia idealo. Ho! kompreni kiel ŝi! Mi volus kompreni kiel ŝi, sed mi tamen ne povas tion. Poste ni trinkas kafon kaj ricevas kuketojn. Tiuj estas tre bongustaj.

La grupo ricevas ankaŭ bildojn kaj vazojn. La bildoj estas de la klubo „La Geranoj”, la vazoj de Jenneke kaj Floor, kaj libro de la grupo el Koedijk. La ĉambro estas tute plena. Ni sidas dekduope sur benko, kiu estas nur mallarĝa, sed hodiaŭ ĉio povas!

Ni ridas, kaj kantas nian klubkanton, kiun verkis onklino Nel, kaj aliajn kantojn.

Je la unua horo ni manĝas niajn buterpanojn, kaj ni trinkas lakton (de nia Esperantobovino, diras iu). En la tagmezo ni kantas, kaj S.ino v. Veenendaal laŭlegas belegan poemon de Gorter. Wim v. d. Hoff deklamas. Venas multaj vizitantoj, homoj por rigardi la novan klubdomon.

La portreto de Zamenhof rigardas sur ĉiuj.
Je la sesa horo ni ĉiuj ĝoje iras hejmen.
Ni ĉiuj volas labori por nia idealo: „Per Esperanto al mondpaco”!
La tuta tago estis bona!

N. Bankersen.

LA FLAGOJ.

La flagoj flirtadas ĉe festaj salonoj,
Ĉe ludoj infanaj, aŭ ĉe la kanonoj.
El ĉiu dometo, palac' aŭ mansardo
Flirtadas standardo.

En tempoj griznigraj se l'koro doloras
La flagoj flirtetas, kvazaŭ ili ploras.
Sed devon ilian fidele plenumas:
Konsole flirtumas.

Sed ĉe niaj festoj kaj demonstracioj
Flirtegas la flagoj kiel gagaj ekkrioj.
Atestas per forta brilad' en sunhelo
Pri pura fidelo.

Se ofte parolas la flag' pri sofismo,
Pri fanatikeco aŭ pri naciismo,
Ne kulpas la flago pri tia misuzo
Sed homa firuzo.

La verda standardo, modesta kaj bela,
Superas ja ĉiujn pro lumo plej hela:
Brilegas ĝi pro ideal' plej racia,
Ĉar supernacia.

Okaze de la inaŭguro de „Nia Kastelo”.

Onklo Pit.

TION NI PLI OFTE FARU!

Vesperigās. — Mi iras tra la krepuska poldero.

Ĵus mi naĝis, sentas min nun tiel libera kaj gaja, freŝa kaj sana. Intense feliĉa mi rigardas ĉirkaŭ mi: la trifolio ankoraŭ tenas la sunbrilon, kiun ĝi dumtage kaptis — helikoj, bufoj, skarabetoj, ĉio ankoraŭ aktivas. Nun la homoj silentas, la bestoj ankoraŭ eligas siajn vesper-sonojn. Blekado, bojado, fluĝetado, la plaŭdado de la sovaĝaj anseroj, ĉia bruetado. — Belega vespersfero!

Subite mi aŭdas post mi: „Ĵen!” Ŝajnas voko de iu, kiu ne havas sonorigilon sur sia biciklo. Sed ĉi tio havis alian signifon.

„Vi iras tiel sole!” — Mi vidas braksvingon, kaj bang! jen falas dika piro apud mi en la herbejon.

Homo, kun via kesteto antaŭe sur via biciklo, neniam piro tiom bongustis! Pli ol la sukan odoron ĝi donis al mi. Estis la pura, spontanea ago, sen konsideroj aŭ pripensoj. Tiu korĝojigo, ĝia boneco. La perfektigo de ĉi horo per la amika kontakto inter homo kaj homo.

Radiante-gaje mi marŝas pluen, meditante: Kial ĉi tio estas tia escepto?

Ĉiu gardas siajn pirojn por tiuj, kiuj estas karaj al li. Se ni pli ofte rompuz tian etan rondon por atingi la nekonatan proksimulon. Jes, ni pli ofte faru tion!

KIUJ HELPOS?

Unufoje monate okazas antaŭ la sveda radio programo: „Ni en nia klubo” (svede). Prezentas sin tiam deko da gejunuloj, kiuj montras kiel ili pasigas sian klubvesperon. Ĝis nun ili tamen neniam propagandis Esperanton. Pro tio la Sveda Esperanto-Federacio petas jenon: Ĉiulandaj gesamideanoj sendu allogajn leterojn pri temoj aktualaj-gejunulaj al la estro de la supra radio-programpunkto. Li tiam certe petos le helpon tradukan de la Esp. Federacio, kaj tiel oni trovos kontakton por propagandi Esperanton en la disaŭdigoj.

Oni skribu multnombre al la programestro: Våran Klubb, Radiotjänst, Stockholm 7, Svedujo.

Svenska Esperanto-Forbundet.

T.J.O.-KOMUNIKOJ.

(Komunikoj por ĉi tiu rubriko al la sekr. de TJO, Owenstr. 59, Leerdam Ned.)

Anglujo: Nia fervora ĉefperanto, John W. Holland, pro malsano devis abdiki. Pro ĉi tio ni perdas energian kunlaboranton, kiu faris gravajn servojn al TJO. Dum la milito li sukcesis grave kreskigi la anglan sektion kaj eĉ povis konservi la kontakton inter diversaj alilandaj sekcioj. En la nomo de ĉiuj TJO-anoj ni elkore dankas lin pro lia bonega laboro kaj deziras baldaŭan resaniĝon kaj revenon sur sia posteno!

La taskon de ĉefperantoj provizore plenumos F.ino N. Rees, Derwydd. *Seven Sisters*, Neath Glam, Kimrujo (enlando); S.ro J. Heath, 74, Pales Road, Ipswich, Suffolk (eksterlando).

Belgujo: Ĉefperanto por Belgujo nun estas: Carlos Braet, Esscheboomstraat 1, Brugge, kiu entuziasme komencis sian laboron. Li jam interkontaktiĝis al diversaj junulargrupoj kaj interrilatas kun la Ministrejo de Publika Instruado (Oficejo de junular-movado) kaj kun la „Nat. Jeugdfront“ kaj „Volksjeugd“ (naciaj junular-organizoj). Sukceson!

La unua numero de la TJO-bulteno de la belga sekcio aperis. La enhavo atestas pri la vigla laboro de niaj belgaj amikoj.

En la Kristnaska ferio la belga sekcio aranĝos kunvenon por TJO-Perantoj.

Francujo: Ĉefperantino: S.ino Turin, Trépot (Doubs). La „Unio de Esperantistoj Francaj“ akceptis la francan sektion de TJO kiel specialan sektion. Stariĝis korespondservo, prizorgata de Dominiko Pérez Guasp, ĉe Mme Ruffié, Rue des Rentiers, Tarascon sur Ariège.

Skotlando: Kiel ĉefperanton por Skotlando ni bonvenigas: S.ro A. Gordon, 28 Holehouse Rd. Kilmarnock, Bondezirojn por la komenco!

Svedujo: Junaj Svedoj, kiuj deziras kunlabori je la fondiĝo de sveda TJO-sekcio, turnu sin al Karl Erik Karlsson, Upplandsgatan, 691, Stockholm.

Nederlando: Entute niaj membroj instruas pli ol 1300 infanojn. Leeuwarden superas ĉion per pr. 230 infanoj.

Dimanĉon, la 11an de novembro, kunvenis nordholandaj TJO-anoj en Heiloo. Kiel ĉiam regis amika sfero. S.ro Kryt prave rimarkis, ke la TJO-anoj formas grandan familion, en kiu ĉiu sin sentas hejmece. La antaŭtagmezaj preparoloj estis tre interesaj. Pro la malbona vetero ne povis okazi la promenado, tamen oni bonege amuziĝis en la salono.

La sekva kunveno okazos en Purmerend, je la 13a de januaro (1946). Komenciĝo je la 10a horo. En la programo sin sekvos kantado, parolado, muziko, ktp. Ĉar en Purmerend ne estas forta TJO-grupo „La Kampfloroj“ el West-Graftdijk helpas en la prizorgado de la programo.

KORESPONDRUBRIKO.

Sendu viajn korespondadresojn al jenaj geamikoj:

Anglujo: S.ro J. Heath, 74, Pales Road, Ipswich, Suffolk.

Belgujo: S.ro P. Cullus, 3, Grand Place, Braine-Les-Chateau.

Francujo: Dominiko Perez Guasp, Chez Mme Ruffié, Rue des Rentiers, Tarascon sur Ariège, Ariège.

Nederlando: S.ro Bakker, Nic. Beetsweg 52, Heiloo, kaj S.ro de Regt, Eendrachtsweg 36B, Rotterdam (ambaŭ urĝe bezonas eksterlandajn gekorespondantojn por siaj 13-15-jaraj ĝelnantoj).

Redakcio: E. van Veenendaal—Bouwes, Limmen, Ned. / Administrado: T. J. O. Centro, West Graftdijk N.H., Ned., ĝironumero 382363.
--